

N. N. 32,
Rozbranĉo
forĝermadis

tradukita de Felix Ney

Rozbranĉo
forĝermadis
el trunk' de nobelec'.
Prauloj jam kantadis:
de Jiŝaj ĝia spec'.
Floreton portis ĝi,
en akra vintro estis,
Je horo de noktmez'.

La branĉo anoncita
Jesaja de profet':
Maria netuŝita,
de kiu la floret'.
Eterne volis Di':
naskinta infaneton
Plej pura restis ŝi.

De tiu eta floro
alvenas bonodor'
Ĝi brilas en la koro,
mallumon pelas for.
Homido, Dia Vort',
nin el sufero helpas,
De pek' Savant' kaj
mort'.

...

N. N. 32,
Burĝonis roz-
zarbedo

*tradukita de Guido
Holz*

1. Burĝonis roz-
arbedo
el delikata sin'
laŭ olda kant-
heredo,
Jiŝaj la origin';
ekĝermis ĉarma
flor'
dum frosta vintro-
tempo
je noktomeza hor'.

2. El virgulin' bea-
ta,
mirinda roz-arbed',
elvenis flor' benata
laŭ diro de profet'.
Laŭ sankta Di-
ordon'
ŝi naskis infaneton
por nia sav' kaj
bon'.

3. Kaj ĉi floreto be-
las,
amindas per par-
fum';
la nokton ĝi forpe-
las
per sia brila lum',
nin helpas el mizer',
el pek' kaj morto sa-
vas;
Li, hom' kaj Di' en
ver'.

...

N. N. 32,
Elkreskis roz-
branĉeto

*tradukita de Joa-
chim Gießner*

1. Elkreskis roz-
branĉeto
el rozarbust' de
Di'.
Aŭguro de profeto
rakontis jam pri ĝi.
Naskiĝis rozfloreto
meze en vintra
nokto
laŭ diro de profet'.

2. Ja naskis tiu ro-
zo -
Jesaj' prognozis
ĝin -
el sia korpo spro-
son
Mari' la virgulin'.
Laŭ dipotenca vol'
ŝi naskis Di-
infanon
por tuta mond'
konsol'.

3. Kaj tiu belflore-
to
tre hele lumas ĝi.
Obskuron la brileto
forprenas nun de
ni.
Vi hom' kaj vera
Di'
el pekoj kaj suferoj
estas savant' por
ni.

...

N. N. 32,
A spotless roze is
growing

tradukita de N. N. 33

1. A Spotless Rose is gro-
wing,
Sprung from a tender root,
Of ancient seers' foresho-
wing,
Of Jesse promised fruit;
Its fairest bud unfolds to
light
Amid the cold, cold winter,
And in the dark midnight.

2. The Rose which I am sin-
ging,
Whereof Isaiah said,
Is from its sweet root sprin-
ging
In Mary, purest Maid;
Through God's great love
and might
The Blessed Babe she bare
us
In a cold, cold winter's night.

...

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de Felix Ney.

Arg-618-1246 (2012-10-18 22:27:59)

Tiu ĉi Esperantigo troviĝas en la retejo <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/r/rozbrancx1.html>.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de GUIDO HOLZ (*1920 – †1989).

Arg-618-1245 (2014-09-07 14:38:29)

Tiu ĉi kanto troviĝas en la eklezia Esperanta kantlibro “Adoru”, n-ro 223. Vidu ankaŭ la retejon <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/b/burgxonis1.html>. Pri Guido Holz vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido_Holz.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).

Arg-618-1244 (2012-10-18 21:24:22)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html>. sub <http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en la Anglan de N. N. 33.

Arg-618-1248 (2012-10-19 08:19:20)

Tiu ĉi traduko troviĝas en <http://ingeb.org/spiritua/esistein.html>.